# Novjorka Prismo

Numero 132 Marto 2004


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia marta kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 19-an de marto 2004, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Jeff Blakeslee prelegos pri *Klasifikado de Biologiaj Specioj;*
– Alex Karkovsky prelegos pri *Stalin kaj Wolf Messing;*
– Ni rigardos 20-minutan vidbendon de Mitsutaka Inui. ★

## Protokolo de la kunveno de la 20-a de februaro 2004

Je la sepa horo ptm, Tom ECCARDT, nia kluba prezidanto, oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 15 personoj. Ĉeestis du gastoj el Buenos Aires, la ĉefurbo de Argentino: Silvia ROTTENBERG, esperantistino, kaj ŝia edzo, Carlos URIA, pentristo, jam konataj de multaj el ni. Antaŭ la oficiala malfermo de la kunveno, la ĉeestantoj parolis kun la edza paro pri la historio de Argentino, la vivo de Eva Peron, kaj la uzo de la hispana vorto *che* por kapti atenton en Argentino. Vincent JACQUES, el Francio, nova esperantisto nun loĝanta en Novjorko, ĉeestis la kunvenon la unuan fojon.

Tomaso demandis, ĉu oni ricevis *Novjorkan Prismon*, ĉu estas aŭ eraroj aŭ komentoj pri ĝi, kaj ĉu la protokolo estis akceptata. Oni respondis, ke oni ricevis ĝin, kaj ne troviĝis eraroj. La protokolo estis akceptata. Tomaso disdonis libretojn en Esperanto pri urbo en la Ĉeĥa Respubliko, kiujn li ricevis el gesinjoroj MEDRANO, kiuj ricevis ilin de domgastoj el tiu lando.

Rochelle F. GROSSMAN parolis pri korea dancisto, kiu estas en Komitato B de UEA kaj volas esti en Komitato C de UEA. Tio bezonas, ke UEA membroj subskribu petskribon. Rochelle ofertis multkoloran ĉapeleton el Bruneio, al iu ajn, kiu volas havi ĝin, kaj Tomaso LEONG akceptis ĝin. Rochelle ricevis ĝin de persono, kiu laboras en la konstruaĵo kie la oficejo de UEA troviĝas.

Je 7:15 ptm, Tomaso komencis sian prelegon pri la filozofio de scienco. Li parolis pri la signifo de la vorto *scienco* en aliaj lingvoj. Li parolis pri la fakto, ke scienco produktas nepruveblajn *teoriojn*, kaj li komparis sciencon al matematiko, kiu produktas pruveblajn *teoremojn*, kaj filozofio, kiu produktas *ideojn*. Li montris la diferencon inter indukta rezonado, de specifaĵo al generalaĵo, kaj dedukta rezonado, de generalaĵo al specifaĵo.

Tomaso diris, *Ĉiu homo estas mortema. Platono estas homo. Tial, Platono estas mortema.* Por nin amuzi, Alex KARKOVSKY aldonis, *Homo estas mortema. Hundo estas mortema. Tial, hundo estas homo.*

Tomaso uzis matematikan ekzemplon por montri kiel matematika pruvo funkcias. Li parolis pri kiel scienco disvolviĝis tra la jarcentoj, kaj nun uzas observadon, eksperimentojn, kaj rezonadon. Li montris kiel diversaj specoj de scienco estas kunligitaj en ĉenon: sociaj sciencoj, kiel ekonomio kaj psikologio, kaj pli bazaj naturaj sciencoj, kiel neŭrobiologio, biologio, kemio, kaj fiziko.

FOTIS: MAKI SANO



*Tom Eccardt rezonas indukte.*

La prelego finiĝis je 8:15 ptm. Poste, la ĉeestantoj babilis kune ĝis la oficiala fermo de la kunveno je 8:45 ptm. Carlos URIA montris bildojn de sia arto al kelkaj ĉeestantoj, kaj li klarigis hispane pri sia arto.

Post la kunveno, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio Cafe World por manĝi kaj trinki. Ni parolis pri la nuna Rusio, pri la antaŭa Sovietunio, kaj eĉ pri Rusio dum la periodo de la caroj. Ni restis ĝis 10:45 ptm. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Laste vizitis . . .

### . . . el Ĉeĥlo

De la 14-a ĝis la 18-a de februaro restis ĉe ni Anna kaj Jiri Vysinka, el Moravio, en la Ĉeĥa Respubliko. La paro vizitis familianon en Florida dum pluraj semajnoj kaj volis sperti nian urbon antaŭ ol reiri hejmen. Dum 5 tagoj ili vizitis preskaŭ ĉion vidindan en nia urbo, de Midtown kaj la Empire State Building ĝis la financa kvartalo kaj la loko de WTC, de Central Park ĝis Coney Island. Ili eliris




ĉiun tagon de sunleviĝo ĝis sunsubiro, kaj vojaĝis preskaŭ ĉie piede. Anna estas arkitekto kaj Jiri estas mekanikisto. La ĉefa okupo de la paro, tamen, estas produkti kaj vendi marcipanon, dolĉaĵon en la formo de fruktoj, bestoj, homoj, ktp. ★

– *Jim MEDRANO*

### . . . el Argentino

Silvia ROTTENBERG, prezidantino de la argentina landa organizo, kaj ŝia edzo, Carlos URIA, restis ĉe mi dum



4 tagoj je la fino de februaro. Ili venis al Novjorko survoje hejmen post vizito al Novmeksikio, kie la filino de Silvia ĵus naskis bebon. Iliaj vizitoj estas ĉiam bonvenaj ĉar ili ĉiam kunportas interesajn novaĵojn/ideojn kun si. ★

– *Tom ECCARDT*



## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Marto 2004** — **19**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

Jeff Blakeslee:
*Klasifikado de Biologiaj Specioj*

Alex Karkovsky:
*Stalin kaj Wolf Messing*

Vidbendo de Mitsutaka Inui

**Aprilo** — **4**

Tagmanĝo
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 133)

**16**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## IBM Plaza

Je la 7-a de marto 15 esperantistoj kuniĝis en IBM Plaza por babili. Nova esperantisto, Danielo Hirsch, ĉeestis. Pam Lieber kunportis "mapon" de la universo, kiun ni trarigardis kaj diskutis. Krome, ni subskribis gratulan karton al centjaraĝa franca esperantistino kaj bondeziran karton al Marta Bergonzoli, kiu estas malsana. ★

– *Tom ECCARDT*



## DUES ARE DUE FOR 2004

**Ĉu vi jam pagis vian kotizon?**

Because of high copying and postage costs, we will once again be reviewing and reducing our mailing list. If we do not hear from you this spring, we will assume that you no longer wish to receive our mailings and we will remove your name from our list.

Membership dues ($15) support the mailing, meeting, and other costs of our local Esperanto movement.

Subscriptions ($7.50) cover *Novjorka Prismo* costs. (Subscriptions are free to U.S. Esperanto clubs and organizations but we encourage you to contact us so that we can better maintain our mailing list.)

We do not want to remove anyone who wishes to remain on our list. Please complete and return the enclosed form or otherwise contact us soon. Dankon! ★

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Suskina (914) 738-6084
**Program-Direktoro** Neil Blonstein (212) 663-2020

**Novjorka Prismo**
Numero 132 – Marto 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2004 Esperanto Society of New York